

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Denova peto por “Nia Unua Lernolibro”

En la lastajara aŭgusto, ni ekspoziciis je la nomo de “Nia Unua Lernolibro”, tiajn lernolibrojn, per kiuj la unuaklasanoj de tiu lando lernas pri sia lingvo. En ĉi-jara septembro kaj novembro, ni intencas havi la saman ekspozicion, kun pli da lernolibroj. Tial niaj legantoj, precipe ekster Japanio, helpu nin havigi vialandan/vialingvan lernolibron. La liston de la jam poseditaj lernolibroj ni montras sube.

La lernolibro atingu nin ĝis la fino de julio, al: Esperanto Jokohama, Nisisiba 4-17-9, Kanazawa-ku, Yokohama-si, Japanio (JP-236-0017).

Jam ricevitaj lernolibroj (en la ordo: lando / lingvo)

【Azio】 (Koreio / la korea) (Ĉinio / la ĉina) (Tajvano [Ĉinio] / la ĉina) (Mongolio / la mongola) (Vjetnamio / la vjetnama) (Hindio (Barato) / la bengala) (Taĝikio / la taĝika)

【Eŭropo】 (Germanio / la germana) (Ĉuvasa Respubliko en Rusio / la rusa, kaj la ĉubasa) (Rumanio / la rumana) (Kroatio / la kroata) (Ĉeĥio / la ĉeĥa) (Slovakio / la slovaka) (Italio / la itala)

【Afriko】 (Konga Demokrata Respubliko / la svahila)

【Meza kaj Suda Ameriko】 (Meksikio / la hispana) (Ĉilio / la hispana)

【Oceanio】 (Aŭstralio / la angla)



fotita de s-ro Doi Hirokaz

Tiel Okazis

Koreio kaj la UK prezentita

La 18an de februaro, ni havis Hama-Rondan Vesperon, de la 17a ĝis la 19a horo. La temo estis la 102-a Universala Kongreso (UK) en Seulo, Koreio, okazonta en la venonta julio. Mizro Iwaya prezentis Koreion, precipe Seulon, ĉar ĝis antaŭ 2 jaroj li ofte vizitis tiun landon

pro sia profesia laboro. Li rekomendis metroajn liniojn por viziti multajn lokojn en la urbo, ĉar unu el la stacioj proksimas al la kongresejo, nome la Fremdlingva Universitato de Koreio. Li menciis biletkarton nomatan “T-money card”. Sekvis klarigo de Sibayama Zyun’iti pri la UK mem, kaj de Doi Ĉieko pri la maniero aliĝi al la UK kaj ties diversaj aranĝoj. En la fino, Iwaya prezentis minimumon de koreaj salutfrazoj.

Pri la 104-a Japana Esperanto-Kongreso

Dato: la 3a, 4a, 5a de novembro 2017. Kongresejo: en la mezo de la urbo.

Kotizo de homoj el eksterlando: 2 000 enoj. Por aliĝo, turnu vin al Japana Esperanto-Instituto (rete: jek2017@jei.or.jp, reteje: <http://www.jei.or.jp/evento/2017/jek/>) Pri la urbo Jokohamo, turnu vin al ni, je info@esperanto.yokohama.

novaj informoj

Okazos prelegetoj pri hamalogio – scioj pri Jokohamo

Nia urbo havas diversajn aferojn unikajn, kaj ni prezentos ilin en serio de prelegetoj. Nun planataj (sed ne findeciditaj) temoj estas:

- ◆ Akvo en Jokohamo
- ◆ Bierfarado en Jokohamo
- ◆ Mangoservo al lernejoj en Jokohamo (kun filmeto)
- ◆ La historio de Esperanto-movado en Jokohamo



Jokohamo 2017
La 104-a Japana
Esperanto-Kongreso

Denove ludota “La Plena Rondo”

70-minuta filmo nomata “La Plena Rondo” estos prezentita, denove post la unua prezento en la lastajara Japana Kongreso en Oumi-haĉiman. Temas pri serio de intervjuoj al esperantistoj, en la japana kaj en Esperanto. Tiun ĉi filmon faris japana artisto sin nomanta “anti-cool”.

Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj

(ĝenerale en KanagaŭaKenmin Sentaa)

*Regulaj Klasoj en sabato:

- (1) Klaso Eseoj por legi “Tamen ĝi moviĝas! (Eseoj pri la Esperanto-Movado)”, kun kolekto de la eseoj en Belartaj Konkursoj de UEA.
- (2) Jokohama Salono. 2 fojojn monate oni legas el libro (de oktobro): “Mondo de travivaĵoj” de Tibor Sekelj; 1 fojon - libera frazfarado; kaj alian fojon - tradukado (ĉiu elektas sian originalon por traduko)
- (3) Daŭriga kurso, gvidata de Fuse Kentarou

*Regulaj Klasoj en merkredo:

- (1) Posttagmeza klaso por legi “La Zamenhof-Strato” de Roman Dobrzyński, gvidita de Doi Ĉieko
 - (2) Antaŭtagmeza klaso Belĉielo por legi libron “La Orpantalono”, gvidita de Doi Ĉieko
- *Krome neregule, la Klason Belflora por legi libron “La Orpantalono”

Niaj Planoj

*apr. 15 [Kanagawa Kenmin Sentaa] Hama-Ronda Vespero

Kvankam detalo ne fiksita, ni omaĝos al L.L. Zamenhof, kreinto de Esperanto, kiu mortis en la 14 de aprilo antaŭ 100 jaroj, en 1917.

*maj. 13 - maj. 14 [Esperanto-Domo de Jacugatake]

Kunloĝado de la membroj en la stagejo de JEI en Jacugatake, 200 km for de nia urbo. Post vespermanĝo ni planas tempon paroli en Esperanto.

*maj. 13- julio 15 [Kanagawa Kenmin Sentaa]

Rudimenta kurso de Esperanto, por 10 fojoj. Gvidos Fuse Kentarou.

*jun. 3 [Kanagawa Kenmin Sentaa] Legokunsido

Leginte jenan libron, oni venu por priparoli la verkon: “Serpento en la puto”, originala romano de István Nemere, kies temo estas islamisma terorismo.

Letero

Eĥo el 3ZZZ

(El “Radio 3ZZZ” venis jena letero, responde al nia artikolo pri “Esperantaj Elsendoj” de Mizro lwaya en la n-ro 323.)

Saluton

Mi tutkore dankas vin pro la regula sendado de via bulteno. Altiris mian atenton via artikolo pri la diversaj radioj en Esperanto.

Unue mi diru ke la retadreso menciita en la artikolo estas malnova. Bonŝance ĝi tamen kondukas al la ĝusta loko, kiu estas www.esperanto.com.au.

Prave temas pri la plej granda multkultura elsendo prizorgata de neprofesuloj en Aŭstralio kaj la Esperanto-grupo komencis elsendi ekde la akcepto de la registaro malfermi tiun radiokanalon en 1989, post longa batalo por ke la lingvoj de la migrantoj estu rekonataj kiel gravaj, ne nur la angla, dank’ al la klopodoj de

Svetislav Kanacki, sed la nombro de grupoj, do de lingvoj uzataj estas iom malpli. Ĝi estas inter 60 kaj 70, depende de la sukceso aŭ malsukceso de la grupoj.

Certe granda parto de la elsendo estas dediĉita al legado de informoj el diversaj ĵurnaloj, bultenoj, revuoj inkluzive de “Novaĵoj tamtamas” ĉefe kiam temas pri informoj rilate la vivon en Japanujo, sed aŭdeblas ankaŭ sufiĉe multe da intervjuoj kaj paroladoj, ĉefe pri gramatiko de Marcel Leereveld kaj diversaj temoj de la ĉiutaga vivo de nia nuna juna kunlaboranto Matt Englezos.

Koran dankon pro via intereso, kio kuraĝigas nin kaj dankon pro la sendado de “Novaĵoj Tamtamas”.

La kunvokanto de la Esperanto grupo

Franciska Toubale

Beletro

Cent formoj da korvoj

orig. Miyazawa Kenzi trad. Sibayama Zyun’iti

Sur vojeto inter neĝa rizkampo
marŝe marŝas marŝo da korvoj.



Korpon flekse sur la neĝa rizkampo
blekas kaj denove blekas jen korvo.

Kolon klinas suben sur la neĝa rizkampo
pike manĝas neĝon jen korvo.

Kolon levas supren sur la neĝa rizkampo
ĉirkaŭ-ĉirkaŭvidas jen korvo.

Ĝuste ĉe la neĝo sur la neĝa rizkampo
Ŝancelpaŝe paŝas jen korvo.

Tutan vojon iris tra la neĝa rizkampo,
pike manĝas neĝon jen korvo.

Supre sur amaso neĝa en la rizkampo
buŝon malfermegis jen korvo.

Sian bekon en la neĝon de la rizkampo
kaŝas kaj sin klinas jen korvo.

Sur digeton sekan de la neĝa rizkampo
salte surlandiĝas jen korvo.

Stire tien kaj ĉi tien super neĝa rizkampo
malrapide flugas jen korvo.

Jen kaj jen jam de la neĝa rizkampo
okcidenten flugas foren jen korvoj.

Sola plu restanta sur la neĝa rizkampo
krurojn sin etendas jen korvo.

Okcidenten flugas foren aro da korvoj
kvazaŭ sin montrante sezamoj.



La originalo: 鳥百態 (宮沢賢治作)

La verkinto: 1896-1936, japana poeto kaj novelisto, ne konata en sia vivtempo, sed postmorte tre fama. Cetere li lernis Esperanton.

Eseo

Muzeo de Rameno de Ŝin-Jokohama

(新横浜ラーメン博物館)

AKIYA Hideo

Rameno estas ne japana aŭtentika kuirajo, nek ĉina, kvankam ĝi iam nomiĝis ĉina nudelo. Nun la nomo "ramen" disvastiĝas tra la mondo. Ĉiuj japanoj, junaj kaj maljunaj, ŝatas ĝin kiel unu el la plej popularaj manĝaĵoj, same kiel rizo-kun-kareo.

La muzeo, la unua japana manĝaĵa amuzejo pri rameno, estas starigita en 1994 por prosperigi la ĉirkaŭaĵon de la stacio Ŝin-Jokohama, kie tiutempe estis ankoraŭ malvigle.

La historio kaj aliaj diversaj informaĵoj pri rameno estas ekspoziciataj en la teretaĝo de la muzeo. Tie estas ankaŭ butikoj-en-muzeo kaj vetkurejo por ludila aŭteto. La kelo de la muzeo formas du-etaĝan atrion, kies sceno estas ŝajnigita kiel vivplena angulo de popola kvartalo de la 1960-aj jaroj.

De ĉiu loko de la lando, multaj ramen-restoracioj kolektiĝas en la korto sur la dua keletaĝo, kaj oni povas ĝui diversajn gustojn de rameno. Ofte en tagmanĝhoroj, la kvartalo estas plej plenigita de malsataj popoloj atendantaj sian vicon.

Laŭ galerio de la unua keletaĝo, ambaŭflanke de mallarĝaj vojetoj viciĝas variaj vendejoj. Super la ŝajnigita kvartalo oni vidas eĉ la bluan ĉielon kun iom da blankaj nuboj. Tie kaj ĉi tie troviĝas elpendaĵoj de karmemoraj kinoj kaj malnovaj reklamoj. Ĉio ĉi bone rememorigas nin pri la tempo antaŭ pli ol duonjarcento.

La muzeo estas;
 • malferma inter 11:00 kaj 22:00 de lundo ĝis sabato, inter 10:30 kaj 22:00 dimanĉe kaj ferie,
 • 5 minutojn piede de la stacio Ŝin-Jokohama (JR), aŭ

• 1 minuton piede de la 8-a elirejo de la metro-stacio Ŝin-Jokohama (Blu-linio).

Enirpago estas;

• ¥310 por mezlernejo aŭ pli, ¥100 por bazlernejo kaj aĝulo 60-jara aŭ pli.

